

esperanto.^o CU

TRIMONATA BULTENO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Kion mi faras
por Esperanto?

Geomar Martínez Pérez / 3



35 jaroj KEA

Por homoj, kiuj ne havas tempon veni al la regulaj lecionoj estas la ekspresa kaj perretpoŝtaj kursoj, estas alia maniero infomi pri Esperanto kaj varbi komencantojn.

La Ekspresa Kurso (EK) temas pri unutaga, ĉirkaŭ 8-hora, kurseto. Jam geinstruistoj Julián Hernández, Pedro Fernández, Javier Ramos kaj Ismary Lezczano okazigis ilin en Havano kaj en Mayabeque.

Feliĉan naskiĝtagon, KEA!

Centra Esperanto-Renkontiĝo 2014

Javier Ramos

De la 12a ĝis la 15a de junio 2014 okazis en Ciudad Nuclear, Cienfuegos, la Centra Esperanto-Renkontiĝo, ĉifoje, unu el la plej bonaj en la lastaj jaroj. Partoprenis 25 esperantistoj el 6 provincoj: Santiago de Cuba, Granma, Holguín, Sancti Spíritus, Cienfuegos kaj Havano. Post alveno de la partoprenantoj ni veturis al Ciudad Nuclear per luita kamiono kiu veturigis nin ĉien dum la aranĝo, estis bona sperto transiri la havenon per pramo. La amasloĝejo havis la plej bonajn kondiĉojn por tiaj aranĝoj: klimatizilon, akvon dum la tuta tago... kaj ejojn por ĉiuj programeroj.

Menciindaj partoj de la programero estis la Interkona Vespero, kiu fakte okazis dufoje pro esploro de la partoprenantoj en la unua tago; prelegoj de Denia kaj Alina, partoprenigaj ludoj Norberto kaj Javier, Guillermo informis pri KLERA kaj la radiostacio, lingvaj kaj gramatikaj interŝanĝoj flanke de Isnel Pupo, kaj la distra programo; informsesio pri JuSKA kaj informoj flanke de Julio César, unu el la organizantoj de la venontjara Kongreso de KEA, kiu ankaŭ parolis pri ĝeneralaj informoj kaj servoj de KEA.

Dum la tuta aranĝo estis elsendoj de la radioamatoroj, kiuj muntis radiostacion kaj uzis la voksignon CO9FAA por kontakti 92 radioamatorojn, kiuj ricevis informojn pri Esperanto kaj baldaŭ ricevos QSL-karton de la aranĝo.



La organizantoj decidis dediĉi tutan tagon al ekskursoj kaj distriĝo. Parto de la programo estis praktiki Esperanton dum la ekskursoj. En Castillo de Jagua la loka historiisto informis al ni pri historiaj faktoj de la kastejo. En la Botanika Ĝardeno de Cienfuegos ni havis gvidanton, kiu montris ekzemplerojn de la kolekto – dum kelkaj esperantistoj klopodis diri la E-nomojn – kaj eksplikis multajn aferojn. Poste okazis distra programo en plaĝo Rancho Luna, kie ni restis dum proksimume 4 horoj.

Kiel ĉiam la renkontiĝo estis bona okazo por praktiki la lingvon. Inter la partoprenantoj estis pluraj spertaj esperantistoj kaj multaj gelernantoj de Guillermo Navarro, kiu aktive partoprenis kaj amuzigis la aranĝon.

Pozitiva flanko estis la fakto ke pluraj spertaj esperantistoj paroligis la ceterajn. La organizo kaj veturado estis tre bonaj. Krome la organizantoj garantiis restadon antaŭ kaj post la aranĝo kaj prizorgis la vojaĝantojn. Iom negativa flanko estis la malĉeesto de multaj konataj esperantistoj el Cienfuegos, kiuj mem kunorganizis la aranĝon, sed surprize ne partoprenis ĝin.

Post reveno al la amasloĝejo kaj nokta adiaŭo ĉiuj dankis al la organizantoj kaj aparte al Heberto, kiu loĝas en la urbo mem, organizis multon kaj venigis plurajn lokajn gastojn. Ni profitis la okazon ankaŭ por festi la 35an Datrevenon de KEA. Alina kaj Aliberto invitis nin al la venontjara aranĝo, kiu eble okazos ie en montaro Escambray.

JuSKA 2014

Junulara Somera Komuna Aranĝo



9-12 oktobro

Feriejo Batalo de Saratoga, Jimaguayú, Camagüey

Kiel atendite jen unuaj informoj pri la 3-a Junulara Somera Komuna Aranĝo (JuSKA 2014), okazonta en provinco Camagüey, en la feriejo Batalo de Saratoga, situanta en la regiono Jimaguayú, tre interesa historia loko kiu indas viziti. JuSKA, kiel nacia kunsido celas evoluigi aranĝojn kiuj plialtigu la lingvonivelon de la gejunuloj por praktika uzado de Esperanto.

ĈEFTEMO: Junularo kaj Esperanta Movado

EJO: En la ĉirkaŭaĵoj de la feriejo okazis tre grava batalo inter hispanoj kaj kubanoj dum junio 1896 kie la elstara Generalo Máximo Gómez, kiu devenis el Dominika Respubliko, montris sin kiel prestiĝa milita strategiulo.

EBLECOJ: Vi povos ĝui diversajn eblecojn, inter kiuj troviĝas: ekskursoj kaj al la rivero situanta tre proksime de la ejo, nomata Najasa, kaj al la historia urbo Jimaguayú. La loko havas porinfanan parkon. Krome estas naĝejo, sportejo, ludejo, dancejo, vendejo, kampadejo, restoracio; eblas rajdi ĉevalojn kaj lui tabulludojn, kiujn disponigos la laborkomisiono de la evento mem.

ALIĜKOTIZOJ: Se vi volas partopreni la 3-an Junularan Someran Komunan Aranĝon (JuSKA 2014) vi jam povas aliĝi. La aliĝkotizo estas 150 kubaj pesoj kiuj inkluzivigas loĝadon, manĝadon (de la 9-a ĝis la 12-a de oktobro) kaj veturon de urbo Camagüey ĝis la feriejo kaj reen. Ne gravas kiom aĝas vi, nur via kapablo scii kaj emon praktiki la Esperantan lingvon, kompreneble vi devas esti membro de KEA. Por kromaj informoj kaj sendo de viaj personaj datumoj: nomo, familinomoj, identigilnumero, provinco, municipo kaj personaj kontaktoj (hejma adreso, retadreso aŭ telefonnumero), vi faru pere de: *arita_piscis14@yahoo.es*, *geomar@esperanto.co.cu*, *carlos@esperanto.co.cu*, *ronald@esperanto.co.cu*. Por pagi vian aliĝkotizon vi povas aŭ telefoni al KEA (7 640 4484) kaj kontakti Yenía Lugones Isalgué pere de Javier Ramos aŭ Ismary Lezcano, aŭ rekte sendi ĝiron ŝianome al la poŝta adreso de KEA:

Yenía Lugones Isalgué

**Vista Alegre 264 entre Juan Bruno Zayas y Luz Caballero
10 de Octubre, 10500 La Habana**

RIMARKOJ: Kapacito estas por 78 homoj, do vi rapidu kaj aliĝu. La limdato por tion fari estas la 31-a de julio. **ATENTU:** Ni ne ricevos aliĝojn post tiu dato, se vi ne pagas antaŭ tiu tago, vi ne povos partopreni!

La organizantoj NE respondecas pri veturado al provinco Camagüey nek pri la reveno, tio estas persona aranĝo individuala. Bv. ne heziti, **PARTOPRENU!**

Junulara Sekcio de KEA

MOVADA EVOLUO: NOTICARO

HISTORIO DE ESPERANTO. Kiel parto de la agado rilate la movadan evoluon, indas atentigi pri tio ke la komisiono pri historio de KEA daŭre kaj stabile laboras, gvidata de Juan Ramón Rodríguez. Estas kelkaj kunlaborantoj kaj planoj pri eldono de libro pri la *Historio de Esperanto en Kubo* iom post iom progresas. Estas bonvenaj pliaj kunlaborantoj kiuj vere interesiĝas pri kolektado kaj konservado de la historiaj eventoj de la E-familio kuba


ESPERANTO POR ĈIUJ. Alia interesa kaj utila agado rilatas al laboro farata de la estrarano Pedro Fernández Rodríguez, temas pri la klubo por la Tria Aĝo lige al kulturo, kiu kunsidas unufoje monate jam ekde la pasinta jaro, kaj krom babili pri la Tria Aĝo oni donas konsilojn por plibonigi la sanon, deklamas poemojn, kaj prelegas pri difinitaj temoj, ĉio rilate la triaĝulojn. Ili estas tre entuziasmaj kaj pretas partopreni. Ni daŭre volas inviti aliajn triaĝulojn al tiuj kunsidoj por pligrandigi la klubon dum tiu ĉi jaro 2014.

ESPERANTO-KLUBO JOSÉ MARTÍ. Ankaŭ funkcias la klubo pri José Martí, la nacia apostolo de Kubo, kiu havas rilaton kun la Kultura Societo José Martí, elstara humanisto, verkisto kaj literaturisto kies eduka idearo restas tre valida nuntempe en ĉiuj agadkampoj de la kuba popolo. Estas ankoraŭ malgranda grupo, nur dek membroj. Ni pretigas laborplanon tiucele. Ni rekomendas al la aliaj provincoj grupigi la triaĝulajn esperantistojn en kluboj.

BIBLIOTEKA APOGO BACHRICH EKfunkcias. Dank' al malavara donaco de la gefiloj de Johano kaj Maria Bachrich, UEA povis denove starigi fondaĵon por subteni la pliriĉigon de la kolektoj de E-bibliotekoj. Ekde 1997 funkciis Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kies kapitalo elĉerpiĝis en 2011. Lastatempe la gefiloj de ges-roj Bachrich donacis al UEA 20 000 USD (ĉ. 14 500 EUR) kiel kapitalon de la Biblioteka Apogo Honore al la Geedzaj Maria kaj Johano Bachrich. La Estraro de UEA akceptis kun granda dankemo la donacon, kiu laŭ la interkonsento kun la gefiloj Bachrich ebligis subvenciojn dum dek jaroj. Biblioteka Apogo Bachrich disdonos subvenciojn unufoje ĉi-jare. Ili estas celitaj al Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia ne-movada instanco. Por peti subvenciojn, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj aŭ aliaj varoj, ordigitaj laŭ prefero. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 30-a de aŭgusto papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ retpoŝte. (*Gazetaraj Komunikoj de UEA*, N-ro 544, 2014-06-02).

NOVAJ LUDOJ EN ESPERANTO. La Berlina esperantisto Chuck Smith, kiu delonge okupiĝas pri evoluigo de programoj por poŝtelefonoj kaj platkomputiloj, ĵus publikigis novan esperantlingvan ludon kaj fondis firmaon kies ĉiuj ludoj laŭplane havos ankaŭ esperantlingvan version. Li kreas amuzajn ludojn por telefonoj, tabulkomputiloj kaj mikrokonzoloj. Ili nun havas ludojn por iPhone, iPad kaj OUYA (Android-mikrokonzolo) kaj pluportas Poker Solitaire al novaj sistemoj kiel Fire TV, Android kaj Windows Phone. (Resumita fragmento el intervjuo farita de *Libera Folio*).

Kompilis kaj redaktis: *mgglez*



Tra la spuroj de niaj klasikuloj (II)

Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



William Auld, skoto, naskiĝis la 6-an de novembro 1924 kaj forpasis la 11-an de septembro 2006. Li estis profesoro pri angla literaturo kaj eklernis Esperanton en 1937, sed nur post la dua mondmilito li tre aktive ekkreis esperantan poezion kaj fariĝis unu el la plej brilaj verkistoj en Esperantujo. Lia unua poezia libro *Kvaropo* (1952) kune kun aliaj tri poetoj samepokaj, fariĝis tre rekonata, kio estis nomata la «skota skolo»; tiu ĉi verko estis eldonita en La Laguna de la profesoro hispana Juan Régulo Pérez, kiu originis la konatan eldonejon *Stafeto*, unu el la plej prestiĝaj dum la 50-aj kaj 60-aj jaroj

pasintjarcente. Alia elstaraj verko estis «La infana raso». Li aŭtoris plurajn poemojn, rakontojn, antologiojn kaj plurfoje estis kandidatigita al la Nobelpremio pri Literaturo ekde 1999. Ankaŭ kiel tradukisto li estis brila; konata pro diversaj tradukoj de William Shakespeare, Oscar Wilde, Jack London aŭ la traduko de la fama verko «La mastro de la ringoj» de Tolkien. Kune kun Marjorie Boulton li populariĝis pro la *Rimleteroj* (1976).

En la pasinta eldono de nia bulteno ni aperigis la rimleteron nro. XXXIV de Marjorie Boulton al William Auld; jen lia respondo:

Rimletero XXXV

de William AULD al Marjorie BOULTON sendita 27.XI.1953

*Antaŭ la firma optimismo
mi kiel ĉiam, Manjo, cedas.
Kvankam espero min nur tedas
pro l' okazonta kataklismo,*

*Kvankam mi staras ĉe abismo,
vi kredu, eĉ se mi ne kredas.
Antaŭ la firma optimismo
mi kiel ĉiam, Manjo, cedas.*


*Kvankam mi staras ĉe abismo,
kaj vivsenco min obsedas
kaj mi esperon ne posedas,
ho vivu, vivu altruismo,*

ankaŭ la firma optimismo!

(El: *la nica literatura revuo*,
3/2 p. 80)

Centjariĝoj (III)

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ



Poŝtkarto sendita al s-ro Rafael G. Crespo en junio 1914

La 22an de junio 1914, la poŝtoŭficejo de Santa Clara ricevis poŝtkarton senditan al Rafael G. Crespo, instruisto en Báez (urbeto de tiu provinco, tiel nomata en tia epoko), laŭ indikas la loka ŝtampilo. Bedaŭrinde, ne videblas la redaktodato far la sendinto: Antonio Ráz (el Beroun, Bohemio, Aŭstrio), kiu skribis kion sekvas:

*Antonio Ráz, instruisto, Delegito de UEA
Beroun III-70, Bohemio, Aŭstrio*

Estimata kolego! Intencante akiri la detalojn pri instruistaj demandoj en ĉiuj mondpartoj (kiujn mi publikigus en "Esperanto Rubriko", kies mi estas redaktoro en loka gazeto) mi turnas min al vi kun peto, ke vi afable kun mi interkorespondadu pri instruistaj temoj per il. p.k. kaj leteroj (laŭeble en leterojn mi ĉiam enmetadus po 2 belegaj p.k.). Sed se vi ne povus akcepti mian proponon, mi petas vian afablecon rekomendi mian ĉi superan adreson al ia konatulo-esperantisto, kiu dezirus kun mi regule koresp. Kun kolega saluto kaj antaŭdanko.

Inst. Ráz

(Mi scias francan, germanan kaj iom rusan lingvojn)

Mia kontribuo al Kuba Esperanto-Asocio

★ Mi eklernis Esperanton memstare en oktobro 2011, poste, en 2012 mi entreprenis la taskon krei repaĝaron por lerni la lingvon aŭtodidakte. ★ Post partopreni KERon, mi ekverkis E-kanzonojn. ★ De tiam mi aktivis ĉiam en ĉiu E-aranĝo ludante gitaron. ★ Mi instruas nuntempe al gelernantoj de la dua nivelo. ★ Mi havas plurajn korespondamikojn, en- kaj eksterlande. ★ Mi prezidas la estraron de la Junulara Sekcio en Kubo kaj gvidas ĝin laŭ miaj kandidatigaj proponoj serĉante labori sub sama strategio en la kvar UEA-agadkampoj: kunordigo, konsciigo, kapabligo kaj komunumo. ★ Mi ĵus diplomiĝis en la Universitato pri Edukado, fako Komputiko, kaj nun mi pli aplikos mian profesion favore al la E-instruado kaj disvastigo. ★ Mi celas ke la junularo agadu pli profesie tiel ke ni subtenu la laboron de la KEA ĉar ni estas ties estonteco.

Geomar MARTÍNEZ PÉREZ, Havano



Kolokvo pri Kubo en Berlino

Kolokvo pri la Kuba nuntempo okazis en Berlino, Germanio dum la Somera Festo de la Berlina E-Asocio, kun partopreno de Héctor Corcho Morales, kultura ataŝeo de la Kuba Ambasadado, kaj Miguel Ángel González, estrarano de KEA. S-ro Corcho Morales pritraktis la reordigon de la Kuba ekonomio laŭ la decidoj de la 6a Kongreso de la Kuba Komunisma Partio, laŭ raporto de la Kuba Ambasadado en Berlino.

Li ankaŭ raportis pri la batalo en la tuta mondo kontraŭ la blokado de Usono kaj por la liberigo de tri kubaj kontraŭteroristoj el kvino arestita en 1998. Gerardo Hernández, Ramón Labañino kaj Antonio Guerrero de pli ol 16 jaroj restas enkarcerigitaj en Usono. René González kaj Fernando González, revenis al Kubo post plenumo de la kondamnoj.

Miguel Ángel González, ra-

portis pri la evoluo de la E-movado en Kubo. Li reliefigis i.a. la rilatojn de KEA kun la Ministrejo pri Kulturo kaj la laboron de Radio Havano Kubo, kiu ĉiusemajne elsendas E-programon.

Inter aliaj ĉeestis s-roj Sebastian Kirf, prezidanto de Germana E-Asocio (GEA), Félix Zesch, prezidanto de E-Asocio en Berlino-Brandenburgio, kaj Peter Kühnel, prezidanto de la E-Asocio Hans Michendorf.

(Libera traduko laŭ: http://www.prensa-latina.cu/index.php?option=com_content&task=view&idioma=1&id=2817181&Itemid=1)

Ekspresa kaj Retpoŝta Kursoj: novaj ebloj lerni Esperanton

ISMARY LEZCANO GARCÍA
(ILEI-Sekciestro, Havano)

Por homoj, kiuj ne havas tempon veni al la regulaj lecionoj estas la ekspresa kaj perretpoŝtaj kursoj, estas alia maniero infomi pri Esperanto kaj varbi komencantojn.

La Ekspresa Kurso (EK) temas pri unutaga, ĉirkaŭ 8-hora, kurseto. Jam geinstruistoj Julián Hernández, Pedro Fernández, Javier Ramos kaj Ismary Lezcano okazigis ilin en Havano kaj en Mayabeque.

La Retpoŝta Kurso (RPK) gvidata de la geoficistoj de KEA estas longdaŭra, tial en la komenco ĝi ne multe sukcesis sed lastatempe la lernantoj estas pli aktivaj kaj entuziasmaj.

Novaj esperantistoj el Artemisa, Holguín, Santiago de Cuba, Mayabeque kaj Havano lernas per tiu ĉi metodo kaj kelkaj el ili intencas partopreni en la Junulara Somera Komuna Arango (JuS-KA) okazonta la venontan oktobron kaj tio utilas, ĉar la plejmulto estas gejunuloj. Menciindas la partopreno de reprezentantoj de Pinar del Río kaj Junulara Insulo dum KERo 2014.

Ne nur varbi kaj instrui gravegas. Oni ne devas supozi ke finlernantoj mem trovos siajn vojojn al Esperantujo.

Ni kiel instruistoj ankaŭ devas klopodi ke ili malkovru la utilon de la lingvo kaj ĝian ideologian valoron. Ĉar verdire kial oni lernas Esperanton? Sendube la respondo povas esti por utilligi ĝin.

esperanto
CUBA

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.cu
www.esperanto.cu/cu



esperanto.cu estas trimonata eldonaĵo por komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. PDF-versio elŝuteblas.
Redaktis: Maritza Gutiérrez, Alberto F. Calienes, kaj Javier Ramos.
Enpaĝigis: Y. Mayol kaj Alberto F. Calienes.

esperanto
CUBA